

Orienta Kuriero 遠東使者

Hongkong P.O. Box 10

Aperis en la aŭgusta numero de 1938

32-34 paĝoj

La Vivstato de Koreaj Virinoj

Im Ĉol Aj

Estas preskaŭ neimagebla la situacio de koreaj virinoj, kiuj suferas en ĉiaj aĉaj cirkonstancoj, ekzisteblaj nur en duonfeŭdalisma socisistemo, subtenata de japana imperialismo. Eĉ ne travivinte la virinan movadon, kiun karakterizas la kapitalismaj nacioj, la koreaj virinoj estas sufokitaj du-triole de l' politika subpremado, la ekonomia ekspluatado kaj la feŭdalisma subjugado, kio devigas ilin krom diversaj hejmaj zorgoj, penadi tutan jaron sen momenta ripozo, en terkulturado, kreskigado de silkraŭpoj, kuniklobredado, kotonfabrikado, ktp. Alie, ili devas migradi kun sia tuta familio en urbojn aŭ eksterlanden por iel tiel panon serĉi. Malgraŭ ĉia penado, ili efektive ne havas kion manĝi. Tial eĉ per plantaĵradikoj kaj arboŝeloj ili devas plilongigi sian vivon.

La ĝis nun ekzistanta feŭdalismo en la kamparoj perdigas al la koreaninoj eĉ la minimuman liberecon, kiun ĝenerale ĉiuj homspecoj povas ĝui. La feŭdalisma sistemo estas protektata kaj subtenata de la japana imperialismo, kiu atentis nur sian intereson katenite de la pseŭdomoralo: "Saĝa edzino kaj bona patrino," "Viro super virino," "Sep malvirtoj de virino" kaj "Virino ne parolu publike." Ekzisto de l' persona indeco de virino estas ekster la demando. Aliparte la tradicio de l' grandfamilia sistemo kaj rilato inter la mastro kaj servanto neniom permesas al ili spiri libere. Ĉi tio estas la rekta rezulto de la japana politiko, kiu ne donas al ili okazon vekiĝi, partopreni la naciliberigan movadon kaj batalon por plibonigi siajn proprajn vivkondiĉojn.

La jam de miloj da jaroj dresitaj koreaj virinoj taŭgas ĝuste al la longhoraj laborado kun malmulte da salajro, kiujn postulas ĝuste la malpeza industrio, kiu estas efektive la ĉefa industrio en la koloniigita Koreio. En tiu situacio la nombro de laboristinoj pli kaj pli grandiĝas. En 1926 la tuta nombro de laboristoj estis nur 17,000, sed en 1936 ĝi kreskis ĝis 34,000, 100% da grandiĝo kontraŭ 5% ĉe la viraj laboristoj. Tiamaniere ili estas forpelataj el malsataj vilaĝoj de la japanaj bienuloj kaj enmigrantoj, kaj fariĝas salajrosklavoj en la japanaj fabrikoj. La statistiko publikigita en 1935 de la japana kolonia registaro mem klarigas, kiom mizera estas la situacio.

La minimuma tagsalajro de plenaĝulinoj: 10 senoj.

Minimuma taga salajro de infanlaboristinoj estas 6 senoj.

Ĝenerala tagsalajro: 46 senoj.

El la tuta nombro da fabrikoj en 42% estas 12-hora labortago. La nombro de fabrikoj, kie oni laboras 10-12 horojn tage, estas 42%. Fabrikoj, kie oni laboras 8-10 horojn tage, reprezentas nur 14%.

La malgranda salajro kaj longaj laborhoroj ne nur malhelpas al ili la sanon per malnutriĝo, sed perdigas al ili ankaŭ la vivon pro nervomalsano aŭ abortiĝo. Ilia laboro neniam estas garantiata. La mastro povas iam ajn maldungi ilin. Nek vivo, nek sano estas laŭleĝe protektataj. Ĝenerale en grandskalaj fabrikoj estas starigita karcersimila loĝejo, kie la mastro devigas la laboristinojn loĝi, severe malpermesante la kontaktiĝon kun eksteraj personoj. La severega fabrika regularo, kaj monpunado finfine forrabas la plejparton de ilia salajro. Se okaze ili strikas, postulante la plibonigon de traktado, la afero jam ofendas la leĝon. En tiuj cirkonstancoj la nura metodo por batali kontraŭ la japanaj estroj aperas ofte en la formo de ribelo aŭ fastado.

Krom fabrikaj laboristinoj estas ankaŭ 43,000 virinoj, kiuj sin okupas pri diversaj profesioj, kiel, instruistinoj, kuracistinoj, vendistinoj, telefonkonektistinoj, kaj aŭtobuskonduktorinoj. Tamen, la salajro al ili estas pli malalta nur pro seks- aŭ ras-diferenco.

La edukado de koreaj virinoj komenciĝis antaŭ kvindek jaroj de usonaj misiistoj. Sed de la aneksado ĉiuj lernejoj, fonditaj aŭ de misiistoj aŭ de koreanoj, estas absolute kontrolitaj de la Korea Kolonia Registaro.

La sklaviga edusistemo de l' japana imperialismo neniom permesas al ili havi okazon progresi krom lerni dommastrumadon, kuiradon, infanvartadon kaj kudradon. La limigo de la nombro de studentinoj estas tiel severa, ke ofte la nombro de aspirantoj superas tri-kvaroble tiun de difinita nombro. Tial eĉ en la elementa lernejo oni akceptas lernantojn laŭ "elekta ekzameno." Jen estas la statistiko pri 1935 indikanta la nombrojn de knabinaj lernejoj kaj lernantinoj;

	Lernejoj	Lernantinoj
Alta Instituto	1	183
Pub. l.	7	1744
Priv. l.	11	869
Instr. l.	Mankas	96
P. el, l.	Statistiko	84777
Pr.l.		8316

Krome estas ankaŭ vesperaj kaj diversaj kursoj fonditaj de la inteligentuloj por laboristinoj, familiaj virinoj kaj precipe por iliaj geknaboj. Tamen, ĉi tiu movado estas sufokita de la registaro per diversaj rimedoj, pretekstante, ke ĝi estas propagandilo de revoluciaj ideoj. Rezulte el la 10,209,880 virinoj nur 196,560 estas edukitaj. Alidire, nur malpli ol du procentoj el la tuta nombro.

Sub tiuj malfavoregaj socialaj kondiĉoj la koreaj virinoj, havante nenian elirvojon, malesperiĝas, kaj sin mortigas (nur en 1936,953 virinoj sin mortigis) prenante negativan vivkoncepton.

La tuta fenomeno klare montras la sovaĝan politikon de la japana imperialismo, kiu tiel subpremis ĉiun viveblecon. Tamen ni kredas, ke en la proksima estonto la sufokita korea virinaro eksplodigos la jam delonge subjugitan pasion en organizita formo, kune kun sia alia seksanaro, kiu malpli suferas ol ili.

Ĉinio Hurlas (ĉiun tagdekon eldonata)

Informa bulteno por eksterlandanoj, kiun eldonis Ĉina Proleta Esperantista Unio
en Ŝanhajo (fondita printempe 1931)

Aperis en aŭgusto 25, 1937, vol. 2, n-ro 4

Leviĝu Koreoj!

(alvoko de la Korea Nacirevolucia Partio al siaj membroj kaj la tuta Korea Popolo
rilate ĉinan-japanan militon)

Por okupi Nord-Ĉinion la Japanaj imperiistaj rabistoj provis depreni Lukoiĉiao-n.
Lukouĉiao estas la gorĝo de Pejpero kuŝanta laŭlonge de la Pejpin-Hankouŝ fervojo,
k estas grava strategia punkto, tial ĝi estas tre grava por la defendo de la Nord-
Ĉinio. Pro tio, la Lukouĉiao-afero koncernas la tutan Ĉinion.

Estas la ŝtatpolitiko de l malamiko sklavigi la korean kaj ĉinan naciojn, tiel ke ĉi tiuj
nacioj estas subpremataj k devigataj agi laŭ la volo de la malamiko. Historio nin
instruas ke pro la “paca politiko”, ligita kun la minacoj, de la malamiko, Koreio
perdis sian tutan landon k Ĉinio siajn provincojn en la nord-oriento.

Nun, kun la spirito batali je kiu ajn ofero kontraŭ la malamiko la ĉina nacio jam
unuiĝis k firmiĝis. La standardo de defendmilito jam alte leviĝis tra ĉiuj partoj de
Ĉinio. La ofensiva intrigo de japan-imperiista “paco” certe estos sekvata de la
grandskala ĉin-japana milito.

Estas necese kompreni ke tiu ĉi milito ne nur estos milito inter Ĉina nacio k la japa
imperiismo, sed ĝi neeviteble disvolviĝos en militon de la subpremataj nacioj en la
malproksima oriento kontraŭ la komuna malamiko.

Ĉiuj nacioj de Koreio tial devas unuiĝi por marŝi antaŭen al la glora fronto de
naciliberigo. Estas la ĉefa tasko por la Korea nacio detruiri en la malfronto la
ekonomiajn k militajn fundamentojn de la malamiko. La tuta popolo, al kia ajn
socitavolo ili apartenu, nepre formu unu solan korpon! Kampanoj en la vilaĝoj,
laboristoj en la fabrikoj, komercistoj, studentoj, civitanoj k virinoj plenumu siajn
parton de la strategia laboro, k organizu naciskalajn armitajn ribelojn. Tiamaniere,
kiam ĉiuj koreoj en la malproksima oriento kuraĝe efektiviĝos sian taskon, nia

